᾿
Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Aprilo 2004 MENSUEL/MONATA 75-a jaro, n-ro 4 (1186)

ISSN 1163.0442

Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

5 €

http://www.sat-esperanto.org/ * retadreso: satesper@noos.fr**

SAT kongresos unuafoje en Slovakio

BRATISLAVA

akceptos nin



Foto: Petro Chrdle

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo...




Karaj, tiu ĉi aprila numero de nia organo enhave estas iom neordinara. Plurajn paĝojn okupas reago de kelkaj kamaradoj pri la pasintjara SAT-kongreso en Ĉaŭdefono. Ni ŝatus eviti ke en venontaj numeroj ni same devu pleniĝi plurajn paĝojn pri tiu sama temo. La PK de SAT proponas, ke ĉiu el vi, kiu havas ion por diri tiurilate, faru tion dum la kongreso en Bratislava. Tie ni esperas definitive fermi tiun dosieron ĉar SAT devas okupiĝi pri multe pli gravaj temoj kaj pri la estonto.

Ĵus okazis krimaj atencoj en Madrido kiun nia redakcio forte kondamnas kaj esprimas sian solidarecon kun la senkulpa popolo de Hispanio kaj kun niaj hispanaj kamaradoj. For la terorismon!

Elkore al ĉiuj,

via Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
*
Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques SCHRAM
Abonnement annuel/jara abono France 55, Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.



JARKONFERENCO 2004 DE SATEB
14-16.05.2004
ĉe Barlaston vilaĝo

Kreŝimir Barkoviĉ, ĝenerala sekretario de la SAT-PK, estos nia gastpreleganto en 2004. Li gajnis "OSIEK-Premion 2002" pro sia tradukaĵo de "7000 tagoj en Siberio" - la temo de unu el liaj du prelegoj. La alia estos "Tri semajnoj en Japanio - sur la spuroj de Lanti".

Por pli bone povi partopreni la diskuton, bonvolu antaŭe legi la libron. La semajnferio estos varia kaj stimula.

Por pliaj detaloj kaj aliĝilo, kontaktu:
Wedgwood Memorial College
Barlaston
Stoke on Trent
Staffs, ST12 9DG
Tel: 01782-372-105/01782-373-4278 rete: wedgwood.college@staffordshire.gov.uk

Se vi ne bone regas la anglan, kontaktu Anne aŭ Ron (vidu ĉi-sube. Ili estas esperantistoj).

Paralele estos Esperanto-Konversacia grupo por komencantoj - gvidata en la angla. Por pliaj informoj, nur pri tio, kontaktu:
Anne Johnson, 42 Beresford Road, London N5 2HZ, Britio, rete: a.johnson@amserve.net
aŭ Ron Lynn, rete: ronsnafulin@aol.com.

Al unu reprezentanto de ĉiu SAT-LEA-o, SATEB donacas senpagan restadon nur dum la semajnfino. Pri tio kontaktu Anne aŭ Ron kiel supre.

SAT-ADRESARO EN LA RETO

Ĵus aperis ĝisdatigita SAT-adresaro sur la TTT-paĝoj de SAT. Ĝi estas konsultebla nur por la SAT-membroj. Por atingi ĝin necesas koni la enirnomon kaj pasvorton. Ĉiuj SAT-membroj kiuj posedas retaliron povas peti de la SAT-oficejo tiujn du kodojn. Okaze de la demando ĉiu bonvolu indiki sian SAT-numeron, kiu pruvas lian-ŝian membrecon. Viajn demandojn vi povas sendi per la retpoŝto al adreso : <satesper@noos.fr>. Tiu ĉi adresaro estas ĉiutage ĝisdatigata.

La PK de SAT

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

Nov-Koloniismo

La novaĵo aperis meze de aŭgusto - do, en epoko politike vakua - ie kaŝita en Flandra gazeto. Ĝia titolo: "Thomas Foley nova estro privatigo-programo en Irako". Artikoleto tute ne por la unua paĝo, ankaŭ neniu informo en radio aŭ televido. Banala informo, kvazaŭ seninteresa sciigo kiu duonkaŝe klopodis vualigi unu el la plej skandalajn eventojn de la lastaj jardekoj. En Usono laŭdire nur "The Boston Globe" kaj iu loka gazeto iomete pritraktis la aferon. La informo pri la estrigo de Foley estas rara, ankaŭ debato pri ĝi apenaŭ ekzistas. Eĉ neniu debato en Unuiĝintaj Nacioj kaj en la Usona parlamento. Amare ni do konstatu ke preskaŭ neniu maldormas pro tia elmontro de pura nov-koloniisma politiko.

Tamen neniel temas pri afereto. La eksa parlamenta prezidanto Foley estis komisiita de prezidento Buch por privatigi 194 ŝtato-entreprenojn en Irako. Foley ja estas sukcesplena konsilanto de la gravega investo-banko, nome la 'Carlyle Group' kiu i.a. provizas la armilar-industrion per ĉiu bezonata kapitalo. Tiu decido de Buŝ estas tre elasta interpretado de la rezolucio 1483 de UN kiu deklaras ke la Uson-Brita aŭtoritato devas akompani la Irakan popolon ĉe ties reformo de la institutoj kaj ĉe 'rekonstruo de la ekonomio'. Tiu sama rezolucio ankaŭ instalis iun 'Evolu-fonduson Irako' en kiun oni injektis unu miliardon da dolaroj el la ekzistanta UN-programo 'petrolo kontraŭ nutraĵo'. La evolu-fonduso troviĝas sub la rekta kontrolo de la Usona reprezentanto Paul Bremer kaj plie havas diversajn ulojn en la estraro el IMF kaj Monda Banko. Per tiu fonduso oni nov-liberale transformas la Irakan ekonomion kio tiel ebligas repagon de Usonaj kreditoj kaj milito-elspezoj. Kompreneble, tiu projekto metos la Irakan ekonomion sub kontrolon de eksterlandaj entreprenoj el kio plene profitos la amikaro de Buch. Marek Belka, la prezidanto de 'Council for International Coordination', organismo por nutri la tiel nomitan 'Coordination of the willing' (nome la aro da landoj kiuj iom helpis Usonon kaj Britio dum ties milito en Irako) ne povis esti pli klara dirante: "Irako fariĝos unu el la plej vastaj konstruejoj en la mondo. Kiu deziras, tie entreprene ĉeesti devas jam nun loke eklabori". La fia rezolucio de UN 1483 fakte ebligas instali en Irako iun reĝimon tre similan al tiu kiun siatempe la Britoj en Irako instalis ekde 1921 dum sia kolonia mandato. Ankaŭ tiam iu marioneta reĝimo, sub Brita kontrolo, devis ŝajnigi posedi regadpovon. Fakte la armeo kaj interna sekureco de Irako estis sub rekta kontrolo de la Britoj kiuj tiel zorgis por sekureco de siaj imperiaj interesoj.

La nuna situacio estas la sama. Surpapere ekzistas nun zorge ekvilibrigita regadkonsilio, akceptita de UN, kun administra kaj eĉ budĝeta respondeco. Sed tiun konsilion superregas la Usona ĉefo Paul Bremer kiu, laŭ koloniisma tradicio, kapablas vetoe nuligi ĉiun decidon konsilian. Baldaŭ la konsilio disponos pri armeo de haste formitaj Irakanoj kiuj devos helpi forigi ĉiun opozicion. Ankaŭ tio kopias la agadon de la eksa Brita koloniisma regado.

Dume la lando riskas droni en ĥaoson. Ĉiutage Irakanoj estas mortigitaj kaj jam mortis pro atenco pli da Usonaj soldatoj ol dum la milito mem. Ankaŭ la Unuiĝintaj Nacioj estas viktimo de atencoj. Ĉio ĉi pro tio ke la nov-konservativuloj kaj iliaj amikoj en Vaŝingtono celas nur propran profitegon. Ili tion eĉ ne kaŝas. Tuj post la milito la subministro de Defendo Paul Wolfowitz deklaris, ke la "amasdetruaj armiloj" estis nur burokrata preteksto ĉar la vera motivo por ataki Irakon estis trovi alternativon por la militaj bazoj kaj petrolo en Saud-Arabio kiu ja fariĝas pli kaj pli nestabila kaj malfidinda. La internacia juro kaj ankaŭ UN estas nuraj ludiloj enmane de la Plej Fortaj. En la nuna epoko la juro estas privilegio de ĉi lastaj. Ĉu justa mondo ? La vojo irota (r)estas longa.

Ludo De Brabander

teksto aperis en la revuo de Vrede (Paco), asocio por paco kaj justeco.

trad: Alberto Fernandez

Korea SAT-peranto en Japanio

La korea SAT-peranto CHOI Manwon vizitis Japanion por esplori pri siaj fakaj libroj kaj por renkontiĝi kun japanaj SAT-anoj. Li gastis ĉe SAT-anoj en Kioto, Gihu, Kanazawa kaj revidis la japanan peranton TANI Hiroyuki, kun kiu li konatiĝis antaŭ dek jaroj en Ĉinio. Li lernis multon kiel komencanta peranto.

En la 17a de januaro li partoprenis en du manifestacioj en Kioto kun mi. La unua temis pri protesto ĉe Ministro de Eksterlandaj Aferoj, s-ino Kawaguti, kiu venis al Universitato Dooŝiŝa por prelego. La Ministrejo decidis sendi Memdefendan Korpuson al Irako en la nomo de helpo al irakanoj. Antaŭ la enirpordo de la universitato mi trovis kun surprizo la belan ĉielarkan banderolon kun la itala vorto "PACE", kiun mi vidis en la lasta SAT-kongreso, kaj poste ankaŭ en Universitato Kioto, kie okazis porpaca kunveno.

Kelkdek manifestaciantoj atendis ŝin antaŭ la pordo de la prelegejo en la universitato, sed policanoj sukcesis inviti ŝin tra sekreta pordo. Junaj manifestaciantoj koleris kaj bruis antaŭ la prelegejo.

Ni rapidis al la dua manifestacio "Porpaca Marŝo kun 1000 homoj" kiu ekiris de antaŭ la urbdomo ĝis la parko Maruyama sub la slogano "Ne sendu Memdefendan Korpuson al Irako". Kiel kutime, survoje plimultiĝis partoprenantoj kaj superis 1000 homojn. Feliĉe neniu estis arestita de polico.

Ĉiusemajne okazas protestaj kunvenoj kaj manifestacioj, sed la registaro jam sendis Memdefendan Korpuson al Irako.

Tamen oni ne rezignas kaj daŭre movadas.

Masakato

VIAJ OPINIOJ

PRI ESPERANTO-CIVITO

Mi volus klarigi kelkajn faktojn okazintajn dum la diskutoj pri la Esperanto Civito en la 74ª,75ª k 76ª SAT kongresoj.

En la unua laborkunsido de la 76ª SAT Kongreso en la Ĉaŭdefono mi intervenis por informi ke en intervjuo de Jesuo de las Heras, redaktoro de la bulteno de HALE "Kajeroj el la Sudo ", farita kun la senatano de la E° Civito Marie-France Conde Rey, oni povas legi, inter aliaj informoj: " Iom da historio : la unua teksto aperinta en Literatura Foiro 170, decembro 1997, nomiĝis la Kvintezo. Al tiu platformo aliĝis pluraj esperantistaj establoj. Reprezentante ilin, la nuna Forumo por la E° Civito diskutis ĉe KCE, Ĉaŭdefono (CH), aŭgusto 1998, kaj redaktis proponon de Pakto por la E° Civito aperontan en LF 175, oktobron 1998. Tiun tekston aprobitan en la dua Forumo por E° Civito en Karlovovaro (CZ), julio 1999, ***en laborkunsido gvidata de Ivo PEYRAUT***, sekvis projekto de Konstitucia Ĉarto de la E° Civito. En Sabloneto (IT), la tria Forumo aprobis kaj promulgis tiun Ĉarton, ***en kunsido gvidata de Kreŝimir Barkoviĉ*****......"**
Mi estis surprizita pro tiuj gravaj ligoj inter respondeculoj de SAT kaj la Eª Civito kaj mi komentis, en tiu laborkunsido, ke tiuj agoj estis faritaj sen ke la membroj de SAT ilin sciu. Nia Ĝenerala sekretario respondis ke pri la gvidado de tiuj kunvenoj aperis informoj en "Sennaciulo" kaj ke mi ne legas atenteme nian oficialan organon. Tiuj asertoj estas duoble falsaj, ĉar la informoj pri la gvidado de la kunsidoj de la E° Civito fare de SAT respondeculoj nenie aperis en "Sennaciulo" kaj mi tre atenteme legas ĝin.

En la "Sennaciulo" de oktobro 2001 (paĝo 134), en la dua laborkunsido de la 74ª SAT Kongreso, aperas la sekvanta informo : "Ĝenerala sekretario de SAT, kdo Barkoviĉ diris, ke pri E° Civito jam dum kelkaj jaroj SAT membroj povas havi la informojn de esperanta gazetaro. Li ankaŭ memorigis ke antaŭ du jaroj en Karlovy Vary, paralele al SAT Kongreso okazis Forumo de Eª Civito. ***Tiam SAT estis invitita kiel observanto*** kaj same en tiu-ĉi jaro nia Asocio estis invitita al Sabloneto en Italio kie okazis Forumo de E° Civito. Plenum Komitato delegis sian Ĝeneralan sekretarion kaj li iris tien por partopreni en la renkontiĝo kiel ***observanto*****......"**

En la 76ª SAT Kongreso, dum la solena malfermo, kdo Walter Zelazny informas inter aliaj aferoj : "La Konstitucio de la Civito fariĝis oficiala danke al kunlaboro, mi substrekas ke temas pri kunlaboro kaj ne komerco aŭ sekreta pakto, kun la kormemora kdo Yves Peyraut, kiu kiel prezidanto de SAT, kadre de la SAT Kongreso en Karlovy Vary ***kunlaboris kaj prezidis la Forumon*** kiu preparis certajn dokumentojn de la E° Civito. Poste la projekto fariĝis la Ĉarto de Sabloneto, preparita de la Forumo kiun partoprenis ĝenerala sekretario de SAT, Kreŝimir Barkoviĉ"... Walter Zelazny forgesis, eble strategie, ke la Ĝenerala sekretario de SAT gvidis la kunsidon de la E° Civito en Sabloneto.

La rilatoj de SAT kun la E°o Civito estis klare deciditaj dum la 74ª SAT Kongreso en Nagykanizsa : " SAT, kiel asocio ne aliĝos al la Civito kaj ankaŭ ne "Sennaciulo" nek "Sennacieca Revuo". La tendenco de la kongresanoj estis malfavora al iu ajn ligo kun la Eo Civito.

Mi legis laŭdojn en la "Heroldo de Esperanto" kaj "Sennaciulo" pri la bona organizado de la 76ª SAT Kongreso.

En "Heroldo de Esperanto" de la 7-30 novembro 2003 aperis jena artikoleto : "Estas difinita la bilanco de la 76ª SAT Kongreso, danke al la librotenado de s-ino Sonja Brun komisie de OKK. La Kongreso, kun riĉa programo kaj altkvalitaj servoj, produktis malgrandan deficiton de kelcento da eŭroj. Per deko de pliaj aliĝoj (ekzemple de najbaroj en Svislando aŭ Francio) rezultus eĉ pozitiva saldo. Bonŝance la amasa partopreno de Eo Civitanoj efikis tre pozitive". Tio signifas ke SAT ne ricevos eĉ cendon de la 50% de gajno kio rajtas kaj povus esti ke la OKK demandu al SAT pagi tiun hipotezan deficiton. Ĉu la enhavo de tiu cinika artikoleto kredeblas?

En la dua kunsido de la 75ª SAT Kongreso en Alikanto (paĝo 136 de "Sennaciulo") nia kdo Vincento Charlot diris pri la Eo Civito :...."Ĉu ni kunvenu en sekto en kiu estas stalinistoj, faŝistoj kaj eklezio? Sed tio estas malpli danĝera afero. La pli danĝera afero estas ke ili ŝtelis "Heroldo de Esperanto" kaj ili volis akapari la "Kvinpetaloj" ktp. Mi kredas ke la membroj de Civito estas tute sinceraj homoj, sed ĉiam aliĝantoj de sektoj estas viktimoj. Do ni devas trovi solvon por ne kongresi en tiu sektejo". La asertoj de nia kdo Charlot montras la monan kaj povan avidecon de tiuj homoj.

En la solena malfermo de la 75° SAT Kongreso en Alikanto, s-ino Marie France Conde Rey portas la vortojn de K-ino Perla Martinelli kiu mem ne povis veni. Ŝi salutas nome de Kooperativo de Literatura Foiro de KCE kaj de Esperanta Civito, kiuj kune organizos la venontjaran SAT-kongreson en la Ĉaŭdefono. En la dua laborkunsido de la sama Kongreso (paĝo 136 de "Sennaciulo") kdo Barkoviĉ diras ke "La Kongreson invitis la KCE kaj ne Civito". La partoprenantoj konstatis la partoprenon de la Eo Civito en la organizado de la Kongreso.

Kelkaj kamaradoj kiuj tro pagis por partopreni la 76ª-n SAT Kongreson atendis/as ricevi la krompagon al kiu ili rajtas. Vere kortuŝa estas la afero pri nia k-ino Anne Raurich kiu ne povis partopreni la Kongreson pro grava malsano, kancero, de sia edzo. En tiu-ĉi kazo la homaj sentoj devis esti prioritataj antaŭ la monavido de la OKK.
Aliaj kamaradoj plendis publike en la franca liberesprimilo "Laŭte". Niaj gekamaradoj Maria kaj Antonio Ribas en la n° 167 plendis pri la organizado, loĝado kaj matenmanĝo kaj nia kdo Michel Duc Goninaz en la n° 168 sciigas ke la kongresanoj kiuj loĝis en hotelo pagis al la OKK, 25% plus ol ili pagintus normale per rekta mendo al la hotelestro.

Nia k-dino Anne Raurich plendis al la Ĝenerala sekretario, ĉar li propagandis la E° Civiton dum prelego en Japanio. Mi tute konsentas kun la kritiko de nia k-dino, ĉar mi konsideras ke kiel simpla SAT-ano aŭ esperantisto nia kdo povas, sur sia respondeco, paroli pri io ajn, sed kiam agadas kiel Ĝenerala sekretario de SAT devas respekti la decidon de la SAT-anaro kiu estas majoritata kontraŭ la E° Civito.

Nia Ĝenerala sekretario sciigis nin ke nia dufoja ekskamarado Jesuo de las Heras aliĝis denove al SAT. Trian

fojon li enviciĝis en nia Asocio kio ne estas montro de seriozeco. En la SAT Statuto kaj Regularo, la paragrafo 7 pri eksigo tekstas : "Estas eksigataj de SAT la membroj, kies agado ne konformiĝas al la Statuto, kiuj intence agis kontraŭ la celoj, principoj aŭ interesoj de la Asocio, kiuj malbonuzis la konfidon aŭ servemon de aliaj membroj....."ktp. Ŝajnas al mi ke la intervenoj de la Ĝenerala sekretario kdo Barkoviĉ en la dua laborkunsido de la 76° SAT Kongreso (paĝo 137 de "Sennaciulo") kaj tiu de la Prezidanto de la PK, J. Schram (paĝo 138) montras la kontraŭ statutajn agadojn de tiu rerekamarado. Plie mi aldonas, kiel mi informis en la Kongreso, ke hispanaj SAT membroj kaj SATEH-anoj estis publike insultataj kaj minacataj de jura proceduro, ĉar ili ne konsentis kaj kritikis la fiagojn de la redaktoro de la "Kajeroj el la Sudo".

Karaj gekamaradoj : Mi petas ke tiu-ĉi artikolo aperu en "Sennaciulo" starigante la veron pri mia interveno en la 76ª SAT Kongreso pri la E° Civito kaj proponas ke por la okazigo de la jara kongreso de SAT ni estu pli singardaj kaj kontrolu pli strikte ĝian disvolviĝon.

Mi proponas la nuligon de la aliĝo de la rerekamarado Jesuo de las Heras pro la montritaj kaŭzoj.

Kamaradece salutas vin,

Marteno.-

****

NDLR:

Ĉar en la supra teksto estas riproĉitaj (akuzitaj) k-do Yves Peyraut (kiu bedaŭrinde ne plu povas defendi sin) kaj mi mem pro niaj partoprenoj en la kunvenoj de E-Civito, jen kelkaj linioj en kiuj mi povas montri ke ni agadis konforme al la decidoj de la P.K. de SAT kaj ankaŭ neniam kontraŭ la SAT-Statuto aŭ kontraŭ la interesoj de nia Asocio.

La PK de SAT decidis kunlabori kun ĉiuj E-Asocioj kiuj proponas al ni kunlaboron, kondiĉe ke tiu kunlaboro ne estas kontraŭstatuta. Tiel ni regule partoprenis al la Strategia Forumo de UEA dum la Universalaj Kongresoj. Dum la UK okazadis kunvenoj de SAT-anoj, ktp.

Jen kronologie la *ekstraktoj el la Protokoloj de la P.K.* pri la kontaktoj kun E-Civito ekde ĝia formiĝo.

25.02.1998 - Vizito Silfer. Okaze de sia vizito al la SAT-sidejo, s-ro Silfer invitas SAT partopreni al la Unua Forumo por E-Civito en Ĉaŭdefono (8-10.08.1998). Ni atendas oficialan skriban inviton.

09.09.1998 - Pro malfrua alveno de la oficiala invito ni ne povis partopreni ĝin. Tamen, ni sendis salutleteron kiu estis tre bone akceptita. Ni ricevos la materialon pri iliaj laboroj.

20.01.1999 - Organizantoj de la Dua Forumo por E-Civito proponas al SAT organizi ĝin dum la SAT-kongreso en Karlovy Vary. La PK verŝajne decidos pozitive, sed ni findecidos dum la venonta kunveno. Ni disponigus al ili lokojn same kiel UEA disponigas al SAT-anoj lokojn dum la U.K.

03.02.1999 - La PK akceptas la proponon ke ĝi okazu dum la SAT-kongreso paralele kun la kongreso - sed sub kompleta respondeco de iniciatintoj.

17.02.1999 - Ni konfirmas al k-do Chrdle ke la Forumo por E-Civito estas tute aparta aranĝo, kiu okazos paralele kun la SAT-kongreso - kaj tute ne estas afero de SAT. Li traktu ĝin kiel apartan klienton kaj apartan aranĝon.

22.03.1999 - S-ro Silfer aperigis en Literatura Foiro ke la SAT-kongreso invitis tiun Forumon por E-Civito okazigi ĝin dum la SAT-kongreso en Karlovy Vary. Ni ripetas tion, kio jam aperis en Sennaciulo, ke tiu Forumo okazos paralele kun la SAT-Kongreso, sed sub kompleta respondeco de organizantoj.

11.10.2000 - SAT estas oficiale invitita al la 3-a Sesio de la Pakto por E-Civito. Ĝi okazos de la 2-a ĝis la 4-a de junio 2001 norde de Italio. Tion ni traktos poste.

08.11.2000 - Forumo por E-Civito: iu el ni devus partopreni, sed ne la prezidanto. Decidota.

07.03.2001 - Forumo por E-Civito - Estas decidite sendi kiel observanton de SAT, k-don Barkoviĉ, de la 2-4. de junio al Sabloneto (Italio), kie okazos la Tria Forumo por E-Civito.

30.05.2001 - Kiel jam estis decidite, k-do Barkoviĉ partoprenos la Trian Forumon por E-Civito en Sabloneto (Italio), kiel observanto. Poste li faros raporton al la P.K. kaj al la kongreso en Nagykanizsa.

27.06.2001- Pakto por E-Civito :- k-do Barkoviĉ partoprenis kiel observanto al la tria Forumo de Pakto por E-Civito en Sabloneto (Italio). Tie estis akceptita la Ĉarto de E-Civito. Oni proponis al SAT aliĝi al la Pakto, al kiu jam aliĝis diversaj grupoj kaj asocioj. Se SAT ne volas, povas aliĝi redakcio de Sennaciulo aŭ de Sennacieca Revuo. K-do Barkoviĉ promesis honeste raporti pri ĉio al la P.K. kaj al la kongreso en Nagykanizsa. Pri tio aperos informo en julia Sennaciulo.

Jes, mi partoprenis tie kiel gasto kaj observanto kaj la ĉeestantoj petis min gvidi (prezidi) la kunvenon kiel neŭtrala persono, ĉar nemembro, evidente sen ia interveno aŭ voĉdono. Tion mi faris.

Dum la kongreso en Nagykanizsa mi honeste raportis pri tiu kunveno kaj dum la debatoj la kongreso decidis ke nek SAT nek ĝiaj presorganoj aliĝu al la Pakto por E-Civito, sed ke ni daŭre observu la evoluon de tiu asocio.

Ni atentigas, ke la cititan diraĵon de k-do Charlot en Alicante, k-do Charlot publike retiris en Ĉaŭdefono, ĉar li estis misinformita kaj ne havas pruvojn por tiuj asertoj.

Pri la repagoj de la OKK al kelkaj gekamaradoj: ili estas intertempe faritaj aŭ estas farataj, ĉu tra UEA aŭ alimaniere.

La aserto ke mi propagandis E-Civiton dum mia prelego en Japanio (Tokio) estas tute falsa kaj inventita. Male, mi propagandis SAT, kaj laŭ la peto de aŭskultantoj mi klarigis kiaj estas rilatoj inter SAT kaj E-Civito. Mi klare diris ke laŭ la decido de la kongreso en Nagykanizsa, nek SAT nek ĝiaj presorganoj aliĝis aŭ aliĝos al E-Civito. Tion povas atesti niaj japanaj gekamaradoj.

En Sennaciulo aperis raportoj pri tio, sed mi ne volas misuzi la spacon kaj denove aperigi tion kio jam aperis en nia organo.

Jen, do, mi opinias ke nek k-do Peyraut, nek mi mem faris ion ajn kio kontraŭas la SAT-Statuton nek agadis kontraŭ la interesoj de SAT. Cetere tiuj kritikoj kaj akuzoj aperas nur nun, plurajn jarojn poste.

Mi volas ankaŭ substreki mian bedaŭron ke tiu teksto de k-do Bustin aperas, ĉar ĝi provokos nur senutilajn polemikojn kaj nur damaĝos al SAT. Pro tio mi estis kontraŭ ĝia aperigo.

K. Barkoviĉ

****

Tiu ĉi teksto de k-do Marteno Bustin aperas ĉar estas lia rajto kiel SAT-ano esprimi sin. La fakto ke Marteno estas PK-ano ne signifas ke li reprezentas la ĝeneralan opinion de la P.K. sed nur personan opinion. Mi petas al tiuj, kiuj deziros reagi, ke ili respektu afablecon en sia vortuzo kaj vortelekto. Nur post pluraj retaj mesaĝoj inter Marteno, Krešo kaj mi, ni decidis fine aperigi la tekston kiel bazon de diskuto.

Jakvo Schram, prezidanto de la P.K.

Pri la Ĉaŭdefona kongreso

En la postkongresaj numeroj de *Sennaciulo* aperis la ŝablona laŭda komento pri « sukcesa kongreso ». Tamen la preparon kaj okazigon de la 76a kongreso en Ĉaŭdefono markis tuta serio da nenormalaĵoj.

Antaŭ la kongreso :

1. En la n° de decembro 2002 aperas la konsisto de tre originala OKK : unu el ĝiaj membroj (k-do Degoul) loĝas tre tre for de la kongresurbo, kaj repondeculino pri librotenado (plej grava funkcio) estas rigardata kiel « ekstera ». Ĝis la n° de junio 2003 inkluzive, la publikigo de tiu listo, ripetiĝanta en ĉiu numero, ne ebligis scii, kiu prezidas la OKK-on (iom hazarde oni eksciis, ke tiun funkcion plenumas s-ro G. Silfer).

2. En la aprila n° la komunikoj de la OKK inkluzivis la « iniciatojn ekster la kongresa programo ». Evidente oni ne povas riproĉi al organizantoj de esperantlingva kongreso, ke ili informas pri esperantlingvaj okazaĵoj ekster-, sed dum-kongresaj (ekzemple diservo), sed oni povas konstati, ke ĉiuj menciitaj « iniciatoj » celis propagandi la kunvenojn de iu difinita organizaĵo. En la n° de majo 2003 aperis, sub la oficialaj informoj de la kongreso, artikolo kun la titolo « Enkonduko al la kongresa temo », subskribita de s-ro G. Silfer, do kvazaŭ kiel komuniko pri la kongreso. En ĝi oni kun miro povis ekscii, ke la kongreso havos « ĉeftemon » kaj ke ĝin enkondukos k-do Enderby. Neniu instanco de SAT decidis pri iu « ĉeftemo » de la kongreso. Al mia rimarko pri tiu miso la ĉefredaktoro de *S-ulo* respondis, ke tiu artikolo reprezentas nur la opiniojn de la subskribinto. Tute ĝusta respondo, sed ĉiu normala leganto povis kredi, ke pro la titolo kaj loko de tiu artikolo, ankaŭ pro la fakto ke s-ro Silfer membras en la OKK, tiu malĝusta informo pri « ĉeftemo » havas oficialan karakteron.

Dum la kongreso :

1. La malferma kunsido okazis, laŭ la rimarko de la protokolinto, « kun iom nekutima disvolviĝo ». Tio estas titolo. Videblis sur la podio flago fremda al SAT (vidu la foton de la n° de julio-aŭgusto) kaj persono (k-do Żelazny), kiu membris nek en la OKK nek en la PK. La fakto, ke li alportis la saluton de iu organizaĵo neniel donis al li la rajton tie sidadi kaj fari longan paroladon, kies enhavon bedaŭrinde oni ne povis submeti al diskuto pro la karaktero de la malferma kunsido. Post iom longa parolado de reprezentantino de la Mondcivitanoj ni aŭdis la legadon de « prelego » (tiel nomata en la protokolo) de k-do Enderby. Oni povas prave opinii, ke k-do Enderby, kiu bedaŭrinde ne povis partopreni la kongreson, estas unu el tiuj, kiuj povintus valore kontribui al la prelega programo de la kongreso. Sed kie estas skribite en la kongres-regularo, ke iu membro rajtas prelegi dum la malferma kunsido ? Kiu faris tiun decidon ? La spektaklo, tre simila al la « solena inaŭguro » de iuj burĝaj kongresoj, finiĝis per la interveno de urba skabenino. Se iu loka instanco iel helpis la okazigon de la kongreso, estas normale ĝin danki kaj eĉ permesi al iu mandatita reprezentanto esprimiĝi dum la malfermo. Sed ni denove devis toleri veran prelegon, kiu konsistis el propagando por la politika sistemo de Svislando (sen debato, kompreneble !). En la momento, kiam laŭstatute la OKK devintus transdoni la organizon de la kunsido al la PK, oni anoncis la finon de la kunsido kaj la kantadon de « nia » (kies ?) himno « la Espero ». La ricevitaj salutoj de ne-partoprenantoj povis esti legitaj nur dum la tria laborkunsido.

2. Oni donis al la k-do Charlot la rajton fari eksterkunsidan deklaron, per kiu li malaprobis sian propran deklaron faritan en la antaŭa kongreso. Ĉiu el ni rajtas ŝanĝi iujn siajn opiniojn inter du kongresoj. Sed nenie en la kongres-regularo mi legis, ke ĉiu kongresano rajtas sciigi tiajn ŝanĝojn per speciala publika deklaro. Kiu donis al k-do Charlot tiun permeson ?

Post la kongreso :

La aŭtentaj tekstoj de la voĉdonitaj Deklaracio kaj Gvidrezolucio estis publikigitaj sur la p. 109 de la julio-aŭgusta numero. Absolute nekompreneble aperis en la septembra numero (p.115) sub la titolo « Definitivaj kongresaj deklaracio kaj gvidrezolucio » la samaj tekstoj, al kiuj oni aldonis « Personan deklaron de k-do Vilhelmo Lutermano ». Kie estas dirite, ke iu ajn membro rajtas aldoni sian personan deklaron al la oficiale voĉdonitaj ? Kiu respondecas pri tiu pli ol stranga publikigo ?

Al la ĉi-supraj rimarkoj kaj demandoj devus, laŭ mia opinio, respondi la PK, kio limigas la riskon de polemiko. Mia interveno efektive ne celas kritiki la menciitajn personojn aŭ disputi senperspektive pri la pasinteco, sed eviti, ke en la estonteco ni spertu similajn malnormalaĵojn. Estus laŭcele atenti i.a. la unuajn tri punktojn de la Alikanta Gvidrezolucio (*S-ulo* de julio-aŭgusto 2002, p.100).

Estu klare ankaŭ, ke mi esprimiĝas en mia persona nomo. Se tiu interveno estos senrezulta, mi kompreneble petos la Ĝeneralan Konsilantaron, ke ĝi esprimu sian opinion.

Michel DUC GONINAZ

MESAĜO DE KAMARADO CHARLOT

Marteno kaj Michel skribis pri mia interveno en Alikanto, laŭdcitante ĝin. Mi ne scias, ĉu mi vere meritas tiujn laŭdojn, ĉar mi publike bedaŭris ĝin en Ĉaŭdefona kongreso.

Mi petas solene amike kaj kamaradece Martenon, ke li konsentu pri ne-aperigo de sia artikolo en "S-ulo", kiu laŭ mi estus kontraŭefika.

Mi tre bone komprenas la sintenon de Marteno, kiu pravas el multaj vidpunktoj, sed mi atentigas nin ĉiujn eviti eternajn diskutojn kaj polemikojn, kiuj aŭtomate venenigus nian organizon kaj dividus nin pri pasinteco kaj alportus nenion al estonteco.


La ĉefa afero laŭ mi estis, ke nia Ĉaŭdefona kongreso reasertis forte kaj firme nian Nagykanizsan decidon esti tute sendependa kaj memstara sen oficialaj ligoj kun Esperanta Civito aŭ UEA, ktp.

Pri estonteco, mi reasertas, ke miaopinie SATEH estas nia fratorganizo en Hispanio kaj ke HALE ne funkcias tiel.

Fratece via al vi ĉiuj,
Vincent Charlot

POST LA PASO DE CIKLONO «ELITA»

Kiel nia kamaradino el Malagasio travivis ĝin.



Kiel vi konstatas mi pluvivas post Elita. Kiam mi estis en la buso direkte al la lernejo, la radio postulis ke pro Elita, kiu pli forte (kun rapida ventego) alvenas en Antananarivon, kaj en aliajn regionojn, ĉiuj gelernantoj reiru la plej eble rapide siahejmen. Malofte Antananarivo estis koncernita de tia "tuj venonta danĝero".

Do, ĉi-matene mi iris ĝis la lernejo. Ankaŭ kolegino venis.

Niaj gelernantoj kiel kutime (ĉi-jare ili estas pli saĝaj) jam atendis siajn profesorojn. Mi intencis instrui al miaj entuziasmaj kaj entuziasmigaj gelernantoj. Krome, de sia hejmo la "ĝenerala kontrolisto" sonorigis la sonorilon. Kaj do ni estis enirontaj niajn respektivajn klasĉambrojn. Sed oni forgesis malfermi ĉiujn pordojn.

La pordmalfermistoj eble daŭre dormis en varmaj litoj. Mia kolegino kaj mi iris al la kontrolisthejmo, kiam li pigre eliris el sia hejmo. Ni demandis al li kion ni faros kun la gelernantoj: "Ĉu ni reiros hejmen aŭ ĉu li malfermigos la pordon?" Li diris, ke oni ĵus telefonis al li por ke li ne sendu siajn gefilojn al lernejo. Kaj ankaŭ li aŭdis per la radio ke ĉiuj reiru hejmen. Sed li ne povas decidi por niaj gelernantoj.

Necesas atendi la lernejestron. Dum li babiladis la vento iĝis pli forta. Branĉoj de Jakarandoj falis. Fine, mia kolegino kaj mi decidis por li, kaj forpelis ĉiujn gelernantojn hejmen.

Tial jen mi estas hejme. Kaj la plej grava: mi havas tempon por longe skribi.

Tamen mi tro frue antaŭĝojis ĉar, ĉiam pro la veteraĉo, la kurento ofte mankas. La radio kaj la televido postule konsilas nin aŭskulti kaj rigardi atente ilin. Sed kiel fari tion kiam ĉiujn 15mn (kaj foje malpli) ili mutas kaj mallumas?


La ĵurnalistoj pri la meteo, per bildo, klarigis al ni, ke Elita similas (kaj ni vidis la bildon) je ege grandega monstro kun sia perforta reveno kaj kun larĝega kaj longega vostego. Ĝi eniris (mardon) en Malagasion, de la nordokcidento (Majunga), malsupreniris suden kaj eliris al la maro iom malsupre de Tamatave. Sed eble ĝi ion forgesis ĉe ni. Aŭ eble ĝi renkontis "Frank", elorientan ciklonon, kiu vagadis en la oceano kaj timigis nian insulon (de malproksime sed minace).

Kolere, pli granda, pli forta (ĝia rapideco estas 13km/h. Sed dum ĝi malrapide iras antaŭen, la rotaciorapideco de la vento atingas 120km h) ol antaŭe, ĝi revenis, iris al Morondava mem, rerevenis (la trian fojon) kaj ĉi-foje ĝi restis iom pli longe en Antananarivo. Pli granda, ĉar nuntempe ĝia kapo estas eliranta el la maro denove sud-orienten (eble Fort Dauphin) dum ĝia vostego trenas en Antananarivo (preskaŭ kovras la 3/4 de Malagasio). Kaj tiu vostego kunportas ventegon kaj pluvegon, elradikigas arbojn kaj faligas domojn (ne la nian -feliĉe, tamen ni kompatas la sinistro-viktimojn).

La tutan tagon mi promenadis ene en lumata ĉambro ĉar ne eblas eliri en la korton. Ni fermis pordojn kaj fenestrojn .

Nun, estas la 18-a, ŝajnas ke la vetero iom beliĝas. Ne plu ventas. Restas nur pluvetado. Kaj espereblas bela vetero morgaŭ. Antaŭ kelkaj minutoj mi kontrolis miajn florojn. Kelkaj estas rompitaj. Sed ne estas grava damaĝo. Morgaŭ mi sendos tiun ĉi mesaĝon.


04/02/04 (la 10a30 en Antananarivo): mi iom eraris pri Elita.



Antaŭ ol definitive forlasi nian insulon, post unu horo da "momenta kvietiĝo", ĝi donis lastan bategon: ventegis kaj pluvegis. Neniu kapablas dormi. Angore ĉiuj atendis la finon, kaj ĉiufoje kiam kvietetiĝis oni kontrolas ĉu la tegmento rezistos). Je la 5-a matene ĝi (kaj ankaŭ la vostego finfine) eliras el Malagasio tra Farafangana (legu esperante: estas la bona malagasa prononcado) lasante multajn falintajn domojn, akvegon kaj do multajn insuletojn ene de nia insulego, … k.t.p. Por ni, estas la muregeto kiu disigis nin de niaj najbaroj, kiu falis.

Hodiaŭ ankaŭ (aŭ ankoraŭ) ni ne iras al la lernejo. Fakte post ciklono, la akvo (en la malaltaj kvartaloj)

altiĝas. Kaj kiam la vetero sekiĝas, estas la bona momento por ke malnovaj domoj falu. Plie, dum unu semajno la vestaro malsekiĝas kaj malpuriĝas (pro tro da koto), tiel ke necesas tempo por solvi tiun problemon. Se ne, almenaŭ duono el la gelernantoj irus nudaj al la lernejoj.



Mi aĉetis pluvombrelon. La tri unuajn pluvtagojn ĝi bone ŝirmis min. Sed kiam ekventegis, ĝi iĝis problemo. Ĝi flugis kunportante miajn 39 kg (mi iom maldikiĝis, sed bonege fartas) kun si. Pluvmantelo pli taŭgus al mi, sed mi ne trovis aĉetindan (kiu vere eltenas la pluvon. Ĉio estas ĉinaĵoj, malmultekostaj kaj malbonkvalitaj vestaĵoj importitaj el Ĉinio kiuj facilege disŝiriĝas). Do, hodiaŭ, ankaŭ mi faras purigadegon. Kaj feliĉe ni havas bonajn ŝuojn!

Mia edzo surmetis la montarajn ŝuojn, mi la ruĝajn, donacitajn al mi lastsomere. Ili kiel aŭto 4x4 bonege taŭgas precipe al la koto de nia kvartalo.

Estas ĝojige iri al la korto. Frumatene ni eliris por ĝui la freŝan aeron kaj balai la korton ĉar ĝi estis kovrita de persikaj kaj vinberaj folioj. Ĉu mi jam diris al vi ke en mia ĝardeno kreskas du persikarboj? Kaj sur la puto estas vinberujo? Jes, ĉar al vi mi sendis fotojn: unu de mi surhavanta juniularan T-ĉemizon sub la persiko, kaj unu en kiu mi estas sidanta sur la puto, kies tegmento estas la vinberujo.

Hieraŭ, profitante de tio ke la gelernantoj ne iris al la lernejoj, kaj do la geinstruistoj rajtas ripozi hejme, ankaŭ la aliaj oficistoj rifuzis labori.

Nur morgaŭ 05/02/04 mi sendos tiun ĉi mesaĝon ĉar mi ne elhejmiĝos hodiaŭ.

Nun oni kalkulas la damaĝegojn kiujn postlasis Elita. 12.000-13.000 sentegmentuloj. Pli ol mil domoj detruitaj. Deko da mortintoj kaj pli ol mil vunditoj.
Sed plej terure: pli ol 75% de la kultivebla tero estas inundita
Oni atendas la kapturnajn plialtigojn de prezoj.
Hodiaŭ matene la televido montris ĝeneralan bildon de la insulo: dezerta pejzaĝo.
Ĝi ne plu estas granda insulo, sed insuletoj diversloke.
Jen la lasta novaĵo ĉe ni.

LALA.

Dekstro kaj maldekstro : kia estas la diferenco ?

Sabate, la 24an de januaro, ni ok membroj de la pariza SAT-rondo kunvenis por provi respondi al tiu demando. Jen, por la aliaj, resumo de tiu diskuto.

La politika signifo de la vortoj « dekstro » kaj « maldekstro » devenas de la Franca Revolucio. Tiam, en la dekstra parto (laŭ la vidpunkto de la prezidanto) de la nacia asembleo, sidis tiuj, kiuj ne volis, ke la sociaj ŝanĝoj okazu tro abrupte kaj tro rapide, dum en la maldekstra parto troviĝis la plej revoluciemaj, kiuj eĉ estis pretaj uzi perfortajn rimedojn por starigi pli justan sociordon. Dum la du postaj jarcentoj, la modelo de burĝa demokratio disvastiĝis tra la mondo, kaj la ideoj pri dekstro kaj maldekstro estis uzataj tra multaj aliaj landoj. En la komenco la dekstruloj estis la reakciuloj, kiuj batalis por la interesoj de la mastroj, dum la maldekstruloj defendis la rajtojn de la laboristaro. La afero iĝis multe pli komplika post la « venko » de socialismo en kelkaj landoj, kie teorie maldekstra gvidantaro subpremis la laboristojn. Aliflanke, en la kapitalisma paradizo, maldekstraj politikaj partioj pli kaj pli forgesis siajn komencajn celojn, kaj ofte kontribuis al la liberaligo de la tutmonda ekonomio, kiun ni nun ĝuas. Krome, pro la malsameco de la situacioj laŭ la landoj, la distingo inter dekstro kaj maldekstro ĉiam estas tre relativa. Do, ĉu ni forĵetu tiujn vortojn por ne fortimigi homojn, kiuj ne plu kredas je politiko ? Ni opiniis, ke ne. Ŝajnis al ni, ke eblas konservi la jenan difinon : estas maldekstra ĉio, kio batalas kontraŭ kapitalismo kaj homekspluatado. Laŭ tiu difino SAT estas maldekstra organizo, ĉar ĝi kontribuas al tiu batalo per siaj kulturaj kaj klerigaj rimedoj.

Jen pri la ideoj. Sed la situacio iĝas multe pli komplika kiam oni transiras al la homoj, kiuj ĝenerale ne estas unublokaj estaĵoj, kaj eĉ ofte montriĝas kontraŭdiremaj. Tiel okazas, ke homoj, kiuj sin deklaras maldekstruloj (do homoj agantaj en la senco, kiun ni difinis kiel maldekstra), fakte kondutas pri kelkaj aferoj laŭ dekstra maniero, tio estas, favore al homekspluatado. Reciproke, homoj, kiuj pro familiaj aŭ tradiciaj kialoj sin difinas kiel dekstruloj, foje tre efike batalas favore al la laboristaro, ekzemple kiam ili postulas lingvan demokration kaj subtenas rektan komunikadon inter homoj el malsamaj landoj. Kun tiuj homoj ni ĉiuj povas konstrue kunlabori pri diversaj klare difinitaj projektoj. Ni ĉiuj konsentis, ke eĉ se la ideoj pri dekstro kaj maldekstro havas sencon, ni nepre evitu glui etiketojn sur individuojn. Tio povus esti nur miskompreniga kaj riskas forpeli interesajn homojn. Fruktodona kunlaborado ĉiam eblas kun homoj, kiuj vere akceptas homajn rajtojn.

Ĉe la fino ni konkludis, ke la temo estas plu diskutenda en Sennaciulo kaj dum estontaj kongresoj, por pli precize difini la konkretajn taskojn de SAT, kiel maldekstra organizo en la nuna mondo, kaj por pli klare prezenti nin al la ekstera publiko.

Vinko Markov

LE MONDE diplomatique en ESPERANTO
Januaro 2004
http://eo.mondediplo.com/

Ignacio RAMONET

Antiterorismo

Ĉar ĝi frapas nebatalantajn civilulojn, la terorismo estas aparte fia luktoformo. Nenia kialo, kiom ajn ĝusta ĝi estas, pravigas la uzon de tiu malŝatinda metodo. La atencoj de la 11a de septembro 2001, kiel tiuj, pli freŝdataj, de Kasablanko, Rijado, Istanbulo, Moskvo aŭ de Hajfo kaj Jerusalemo povas veki nur repuŝon kaj abomenon. Same kiel cetere la uzo, fare de certaj registaroj, kiel formo de subpremo, la « ŝtatterorismo ».

Ŝancelitaj de la atakoj de la 11a de septembro, tiom perfortaj kiom neatenditaj, la aŭtoritatoj de multaj landoj urĝe promulgis leĝojn kiuj difinas novajn krimojn, malpermesas certajn organizojn, limigas la civilajn liberecojn kaj reduktas la garantiojn kontraŭ la atencoj al la fundamentaj rajtoj. [ ]

La unua kiu faris tion estis Usono. Jam la 26an de oktobro 2001, la Kongreso adoptis leĝon taŭge baptitan Patriot Act (Provide Appropriate Tools Required to Intercept and Obstruct Terrorism [ ]. Ĝi donas esceptajn povojn al la polico kaj al la informservoj, reduktas la rolon de la defendo kaj pridubigas la *habeas corpus*, kiu garantias la individuajn rajtojn. Tiu leĝo permesas la areston, deportadon kaj izoladon de suspektuloj - la aŭtoritatoj povas aresti kaj reteni eksterlandanojn por nedifinita tempo. Ĝi nuligas ĉian justican komision por fari traserĉadojn, telefonajn subaŭskultadojn aŭ kontroladon de poŝtaĵoj aŭ de interretaj komunikadoj.

Antaŭenigante ankoraŭ pli la « sekurecan » devojiĝon, la prezidanto George W. Bush subskribis, la 13an de novembro 2001, dekreton kiu starigas militistajn esceptotribunalojn rezervitajn al eksterlandanoj. La koncentrejo de Gŭantanamo estis kreita. Fine, la 5an de januaro 2004, ekvalidis la programo US Visit kiu trudas al ĉiuj eksterlandanoj venantaj al Usono kun vizo, meti siajn dekstran kaj maldekstran montrofingrojn sur legilo de fingrospuroj kaj lasi sin foti.

Eksterkutima en tempo de paco, tiu arsenalo de disponoj indaj je aŭtoritata ŝtato rapide servis kiel modeloj por aliaj landoj. Por komenci per la Unuiĝinta Reĝlando, kiu ne hezitis escepte nekonformiĝi al la artikolo 5 de la Eŭropa Konvencio pri homrajtoj [ ] kaj adoptis, en 2001, antiterorisman leĝon kiu permesas malliberigi senlime, senakuze kaj sen juĝo ĉiun eksterlandanon suspektatan konstitui minacon por la sekureco de la lando.

La ministro pri internaj aferoj, s-ro David Blunkett, deziras akrigi tiun leĝon - la plej drakona de Eŭropo - kaj apliki ĝin ankaŭ al britaj civitanoj. La suspektatoj povas esti juĝataj prevente dum sekretaj procesoj sen ĵurio. La juĝistoj de tiuj specialaj sekcioj, kaj la advokatoj estus « selektitaj » de la sekretaj servoj por faciligi la kondamnon de la suspektatoj. S-ro Blankett volas ankaŭ ke la pasportoj estu provizitaj per icoj [ ] kapablaj stoki la fingro- kaj retino-spurojn...

En tiu orvela [ ] kunteksto, la franca registaro siavice fortigis la sekurecan arsenalon per adopto de la leĝoj Sarkozy (tiu pri la ĉiutaga sekureco, en novembro 2001, kaj tiu pri la interna sekureco, en februaro 2003), poste, la 11an de februaro 2004, la Leĝon Perben 2. Publike akuzita de ĉiuj advokataj organizaĵoj, tiu karakteriziĝas per la antaŭtrakta enketo. Esplorado organizita sen ke la koncernata homo scias pri tio. Sekreta, nekontraŭdira proceduro, kaj de nelimigita daŭro. La arestitaj personoj povos esti areste retenataj dum 96 horoj. La policanoj povos apliki specialajn esplorteknikojn, kiel subaŭskultadon, infiltradon, detalan kontroladon per enmeto de mikrofonoj kaj filmiloj en la privatajn ejojn. Ili povos ankaŭ, dum foresto de la suspektatoj, fari dumnoktajn traserĉadojn.

Kuraĝigite de la ekzemplo de la demokratiaj registaroj, la plej subpremaj reĝimoj urĝe saltis sur la antiterorisman trajnon. En Kolombio, Indonezio, Ĉinio, Birmo, Uzbekio, Pakistano, Turkio, Egipto, Jordanio, Demokratia Respubliko Kongo, la aŭtoritatoj nun kvalifikas la kontestantojn *« simpatiantoj de la teroristoj »* por sufoki ilian opozicion [ ]...

Tradicie ne tre sentemaj pri la rompoj de ekonomiaj, socialaj aŭ kulturaj rajtoj, la grandaj demokratioj metis ĝis nun la defendon de la politikaj rajtoj en la plej altan rangon de siaj atentoj. Ĉu la antiterorisma obsedo kondukos ilin al neado de tiu fundamenta postulo ? Dekretante la esceptostaton normo kaj ŝanĝante la policon al centra figuro de la sistemo, ĉu la demokratioj ne faras, sub niaj okuloj, memmortigon ?

[ ] Vd la raporton 2002 de Amnestio Internacia.

[ ] Provizi la taŭgajn instrumentojn por malkovri kaj kontraŭagi la terorismon.

] *The Economist*, Londono, 6a de decembro 2003.

[ ] Icoj : akronimo por 'integritaj cirkvitoj'. -vl

] Orvela : de Orwell. -vl

[ ] Vd la raporton de PEN Internacia « Antiterrorisme, écrivains et liberté d'expression [Antiterorismo, verkistoj kaj esprimlibereco] », Londono, novembro 2003.


SAT Kulturpaĝo



redaktanto Cezar

Karaj geamikoj,

hodiaŭ mi volas raporti iom pri la cirkonstancoj en kiuj la juna Brecht verkis sian poemon "Memoroj pri la Marinjo A." La ino efektive ekzistis, ŝia nomo Marie Rose Aman. Li konatiĝis kun ŝi estante dekokjara. Sed Marinjo rakontu mem: "En la frua somero de 1916 oni prezentis Eugen Brecht al mi en glaciaĵejo. Ekde la unua momento mi estis impresita de la bonega konduto de la gimnaziano, de liaj rondaj belaj okuloj, kiuj sekrete strabis al mi. Sed tion la kunlernantinoj, kiuj sidis kun mi ĉe la tablo, tute ne rimarkis. Kaj efektive li donis al mi ankoraŭ en la sama horo notfolion, sur kiu li faris komplimenton pri mia longa hararo kaj insiste petis min pri rendevuo. Ni



Lago ĉe la domo de la familio Brecht, kie Marinjo ricevis kison

vidis nin poste kiel hazarde kelkajn fojojn... Ankaŭ kun miaj gepatroj ekestis malfacilaĵoj..."
Kiam Brecht kisis ŝin la unuan fojon, ŝi forpuŝis lin, ne sciante, "ĉu kisoj povus havi sekvojn". Li diris: "Kara infaneto, vi devas iri al via patrino, por ke ŝi instruu vin pri tio. Tio ne povas esti mia tasko." Ŝi vizitis lin poste kelkajn fojojn en lia bohemia mansardo. "Unufoje diris Brecht al mi, ke li permesos venonte nur unu ĉapelon po jaro al mi, sed ke li surprizos min por tio en la iro de la tempo kun sep infanoj." La poemon junulo Brecht verkis en trajno, en la jaro 1920, ankoraŭ tute ne disigita de ŝi. Sed li jam divenis, ke de Marinjo restos ne pli ol nur alta blanka nubo en la ĉielo.

via Cezar




Brecht

Mi ne faris multon

Tiun someron mi ne faris multon, mi iom naĝis, kelkon legis, nenion amis. Sed mi ne pigris. Mi devis transŝoveli mortintojn kaj kutimiĝi je ilia aspekto. Pli terure ol tio, ke mi faris nenion, estis tio, ke mi komencis multon. Almenaŭ kelkaj baladoj estas pretaj. Ankaŭ la segolaboro je la branĉo, sur kiu mi sidas, progresas, kvankam lante. Sed la sekurecon mi ankoraŭ elpelos el mi.

taglibroj, 12-26-1920

Patro kaj filo



Patro Brecht

Tagmeze paĉjo parolas sensencaĵojn pri la komunismo. Du pomoj en la ĝardeno estas ŝtelitaj. Mi defendas la ŝteliston: Kion arboj faras, apartenas al neniu. Poste paĉjo krias, ke estas skribite en la gazeto, ke la Entento*-komisiono fiksas la polican horon je la 23-a, ke tiel aĉe fariĝis pro tiaj uloj, kiaj mi. Li volas scii, kion mi jam faris por la ĝenerala bonfarto. Li diris, ke ankoraŭ tute nenion, ke mi eĉ post kvin jaroj ne faros mian kuracistan antaŭekzamenon, ke li volus vidi foje antaŭ ĉio seriozan laboron de mi. Tion, kion mi faris laŭ lia opinio kun mia literaturo, estis por li nenio. Tio devus montriĝi ankoraŭ. Mi rapide eliris. Mi enspezis ankoraŭ nenion.

taglibroj, 09-15-1920

*Entento: Alianco de kelkaj regnoj - ekz. Kora Entento inter Britio kaj Francio en 1904. Triobla: la samaj + Rusio en 1908.

Marie Rose Aman

Brecht, kiu ne havis multe da feliĉo kun ŝi, skribas en letero al Caspar Neher: Mi do ne plu povas kisi la Rozmarinjon (ŝi havas, malsekajn plenajn lipojn en la pala soifa vizaĝeto). Sed mi povas kisi aliajn, kompreneble. Mi vidas mil buŝojn antaŭ mi, kiuj sopiregas kison de mi. Tridek jarojn mi donas al mi kaj kvin kontinentojn. Sed la Rozmarinjon mi do ne... Kruco kaj diablo! Kio estas mil ebloj kontraŭ unu maleblo? Forgesita estas la forto = fuĝo pro - malforto. La plej alta estas preni, kion oni povas preni al si. Kaj la alia? Sed la alia, kion oni ne povas...? "Ne povas ekzisti dio, ĉar alie mi ne povus elteni tion, ne esti dio." Kiu ne ridas pri tio? (Ankaŭ la ridado estas ia forto de la malfortuloj!)

letero, 12-18-1917



Loĝdomo de familio Brecht en Aŭgsburgo

Komento de Brecht pri la tempo, kiam la poemo ekestis

Mi plenkreskis kiel filo
de bonstataj homoj. Miaj gepatroj
ĉirkaŭligis kolumon al mi kaj edukis
min en la kutimoj de priservato
kaj instruis min pri la arto ordoni.
Sed kiam mi plenkreskis kaj
ĉirkaŭrigardis, la homoj de mia
klaso ne plaĉis al mi,
ne la ordonado kaj ne la priservoj.
Kaj mi forlasis mian klason kaj
aliĝis
al la pli simplaj homoj.

Bertolt Brecht

Memoro pri Marinjo A.

Sentimentala kanto nr-o 1004



1.
En tiu tag' sub blua lun' septembre
Ĉe juna pruna arbo en komfort'
mi tenis ŝin, la palan mutan karan,
kaj kiel sonĝon, en la brak' sen vort'.
Kaj super ni somere en ĉielo
mi vidis nubon longe kun fervor'.
Ĝi estis blanka, nekredeble alta.
Ĉe l' rerigardo ĝi jam estis for.

2
De tiu tago pasis multaj lunoj,
kaj nuboj naĝis multaj en la vent'.
La prunaj arboj eble ne plu staras,
kaj pro l' demand' pri mia
amkontent':
mi diras nun, mi tute ne memoras,
amik', sed vin komprenas kun
konsent'.
Vizaĝo ŝia tamen tiom foras.
Mi scias nur, mi kisis ŝin kun sent'.

3
Kaj eĉ la kis', ĝi estus forgesita,
se ne estintus tie tiu nub'.
Mi scias ĝin kaj ĉiam ĝin mi scios.
Ĝi ege blankis en la alt', sen dub'.
La prunaj arbój eble eĉ plu floras.
Ĉu sepa id' de l' in' ĵus krias en la
fru'?
Sed tiu nubo floris nur minutojn,
Ĉe l' rerigardo svenis jam en blu'.

tradukis Cezar

Manuskripto de B. Brecht

Bonan apetiton

Prunkuko

Ingrediencoj: panfermenta pasto * 2 kg da prunoj * butero * sukero kaj cinamo


Knedu la paston kaj lasu kuŝi ĝin en varma loko dum 15 minutoj. Senkernigu la prunojn kaj duonigu ilin.
Platrulu la paston kaj aranĝu ĝin poste sur grasumita bakpleto. Surmetu la prunojn kun la haŭtflanko malsupren. Baku la kukon en antaŭhejtita bakforno dum 40 minutoj ĉe 200 gradoj de Celsius. Laste ŝmiru buteron sur la varman bakitaĵon kaj tuj surŝutetu sukeron kaj cinamon.

Bonan apetiton deziras, via
Dorotea!

SPECIALA OFERTO

ANTAŬA PIV

je tre favora prezo




Por individuoj:
30 € inkluzive la afrankon.

Por libroservoj:
25 € nete + afranko.

Bonvolu mendi ĉe SAT:
rete: satesper@noos.fr

El la SAT-sidejo
67 avenue Gambetta
FR-75020 Paris



NOVA P.I.V.

Prezo :
por Francio 70 € + 4,64 € (afranko)
por Eŭropo: 70 € + 7,29 € (reg.afr.)
ekster Eŭropo :70 € + 10,40 € (reg. afranko).

HELPO AL LA ASOCIO

En Svisio (CHF) : Rooke 14,00;
En Francio (€) : Blary 5,00; Grimaud 5,00; Dufourg 10,00; Bore 20,00; Chevrolat 5,00; Le Floch 15,00; Cavalier 20,00; Boyer 5,00; Letzgus 5,00; Martinez 5,00; Haren 10,00; Masseron 30,00; Ge-Rapley 75,00; Cagnard 20,00;
En Germanio (€) Bolter 10,00; Bues 50,00; Conzeth 10,00; Mickle 20,00; Hocke 100,00; Scherm 40,00; Rodewig 25,00; Ehlers 20,00;
En Hispanio (€) Trinitat Garcia 8,00;
En Portugalio (€) A. Kasesa 5,00; M. Pedrosa 5,00;

PERANTADO EN HISPANIO

Karaj gekamaradoj,
Dum la lasta jaro mi havis gravan laboran problemon kiu malhelpis min plenumi mian taskon kiel peranto de SAT tiel bone kiel mi deziris. Mi plurfoje petis volontulon por transpreni tiun taskon, sed neniu reago okazis. Kvankam mi klopodis iom post iom kunordigi la aferon, antaŭ nelonge mi kun granda bedaŭro eksciis, ke anstataŭ proponi helpon aŭ transprenon de la tasko, kelkaj kamaradoj preferas montri sian nefidon al mi. Kompreneble, je tiuj kondiĉoj mi ne povas daŭre okupiĝi pri la perantado de SAT en Hispanio. Pro tio, ekde la 31 de majo, mi FINFINE REZIGNAS. Post tiu dato mi fermos la konton kaj sendos la ricevitajn ĝis tiam kotizojn al Parizo.
K-do Pedro Sanz tre afable proponis sin por peranti ekde la 1-a de junio. Se neniu kontraŭas, li pretas esti la nova peranto de SAT en Hispanio.
Kamaradece,

Pedro Hernández

Noto: Kun bedaŭro ni estas devigataj akcepti tiun decidon. Ni do dankas nian junan kamaradon pro la farita laboro. Same ni dankas al k-do Sanz pro la bonvolo akcepti tiun taskon. En la maja numero de Sennaciulo aperos informoj pri la nova peranto. Ĝis tiam la peranto estas k-do Hernandez al kiu bonvolu pagi viajn kotizojn.

La PK de SAT

JAM ESTAS APRILO
ĈU VI PAGIS VIAN KOTIZON 2004?

INTERVJUO KUN SALVADOR GUMA I CLAVELL

Tiu ĉi intervjuo kun nia k-do Salvador Guma i Clavell okazis en majo 1987 kaj neniam ĝis nun estis publikigita. Nia kamarado mortis 101-jara en majo 2003 kaj nun ni aperigas ĝin. La intervjuon faris nia kamarado V. Hernandez Llusera.

D: - Samideano Guma, de kie venas via esperantisteco?

R: - La kvina Universala Kongreso de Esperanto okazis en la jaro 1909 en Barcelono. La persona prestiĝo de la organizintoj kaj la ĉeesto de d-ro Zamenhof faris la kongreson tiel brila, ke ĝi disradiis malproksimen tre favoran impreson por Esperanto. En Alcover, vilaĝo 100 kilometrojn malproksima, estis instruisto s-ro Fr. Serra, kiu audinte pri la nova lingvo ekstudis kaj konigis ĝin al rondo de amikoj. Inter ili estis mia patro, kiu mirigita de tiu lingvo ofte aludis pri ĝi en la hejmo. Tiam mi estis apenaŭ okjara, sed jam pense varbita al Esperanto pro la favora patra opinio. Post sep jaroj mi elmigris Barcelonon. En brokantejo mi vidis la libreton de d-ro Bremon: "Quiere aprender Esperanto?" kaj aĉetis ĝin por 50 centimoj, t.e. la valoro de mia tiama naŭhora salajro. En septembro de la jaro 1917a, en butiko mi vidis afiŝeton: Cursos de Esperanto en la Sociedad "Paco kaj Amo". Malgraŭ la timiga malproksimeco mi enskribigis min. El 25 lernantoj, sekvis ĝis la kursfino ne pli ol ses kun mi.

D: - Ĉu Esperanto estis malfacila al vi?

R: - Neniam mi trovis malfacilaĵojn kaj baldaŭ mi distingiĝis per mia flua parolo. Erarojn mi neniam praktikis.

D: - Posedante, do, la lingvon, ĉu vi instruadis ĝin?

R: - Kompreneble, jes. Unue en Barcelono, sekvis Parizo, unu franca vilaĝo, poste Alcover kie mi naskiĝis, kaj fine Reus, kie nun mi loĝas. Laŭ mia migrado, almenaŭ ok kursojn.

D: - Ni volus koni viajn rilatojn kun Sennacieca Asocio Tutmonda.

R: - Kiam ĝi fondiĝis, tuj en Barcelono ni kreis aktivan grupon. Mian unuan artikolon mi verkis por ĝia organo, kaj la korespondadon kun S.A.T. mi mem faris, sed nur ĝis aŭgusto 1923.

D: - Kial?

R: - Ĉar pro malagrabla soldatserva afero mi ekziliĝis en Parizon. Tie min akceptis kamarado Glodeau, la tiama SAT-administranto. En la SAT-rondo mi konatiĝis kun diverslandaj kolegoj, junaj kaj viglaj. Tial mia agado en Parizo estis plene en la SAT-medio. Mi vivis en kaj por Esperanto. "La Revista Blanca" de Barcelono publikigis unu mian artikolon; la organo de SAT, du. Por reeldono, mi reviziis laŭ la peto de Barthelmess, la verkon "Ni Legu". Por bulgara gazeto, petite de Atanas Atanasov, mi tradukis plurajn "Baladojn" el la verko de Pi Arsuaga, filo de la famekonata Pi y Margall. De fama franca kanzonisto mi tradukis renoman kanzonon, kaj gvidis kurson en loko, kie la korifeo de la reformintoj, Papillon, instruis samtempe la reformaĵon de Esperanto....

D: - Ĉu vi povas rakonti iun anekdoton el tiu tempo?

R: - Kiam, kun Glodeau, mi venis en la SAT-rondon, mi konatiĝis kun Armando, proksimume samaĝa kiel mi kaj ankaŭ ĵus veninta Parizon. Oni paroligis nin antaŭ la kunsidantoj, ĉar ni estis la freŝa kaj agrabla surprizo. El lia propra parolmaniero mi ne povis diveni lian landanecon. Fine mi riskis demandi lin: "El kiu lando?" Post hezitado, li respondis: "El neniu! Mi esta sennaciulo ĉar mi naskiĝis en vagono ĝuste kiam ĝi surveturis la limon inter du landoj! Pli poste mi sciiĝis ke li estas hungaro persekutita en sia lando, fuĝinta kien li povis, kaj ĵus forpelita el Danzigo. Pli poste ankoraŭ la francaj ĝendarmoj ordonis al li forpeliĝon, sed li plu restis kunportante ĉiam la forpelordonon, ĝis... li mem forpelis sin en sennaciecan mondon, ĉar pro galopa ftizo kaj ne helpite de Kompartio, kies ekstreme fidela membro li estis, li mortis.

D: - Rakontu plu!

R: - Tiam okazis franclingvana kongreso en la norda urbo Rouen, kaj mi ĉeestis. Sekvis la SAT-kongreso en Vieno en la jaro 1925. Tiel ĝi logis min, ke kvankam mia pasporto ne estis en ordo, mi superruzis la leĝojn kaj ĝi pleniĝis je normalaj vizoj de la traveturotaj landoj. Tuj kiam en la kongresejo k-do Lanti ekvidis min, li proponis al mi okupi sidlokon sur la estrado apud la tablo kie meze prezidis E. Drezen, kaj unuflanke k-dino Limuzine (de la Kompartio) kaj mi, kaj aliflanke Riĥter kaj eble aliaj. Baldaŭ fariĝis vigla debato inter la klera Drezen, flue oratore parolanta, kaj mi, tiam nur 24-jara. La kaŭzo estis, ke oni disdonis tie plurajn ekzemplerojn de "Libera Laboristo", gazeteto de la senŝtatano Migny, kun artikoloj de Levandovski kaj Zilberfarb, la kleraj tradukintoj de la "ETIKO" de Kropotkin. Drezen evidente koleriĝis, kaj ripete diris emfaze: "Ni, kiuj faris la revolucion"... kaj postulis toleremon.

La pola, renoma k-do Jan Zawada, kunveturinta kun mi el Parizo ĝis Vieno, estis homo mildkaraktera kaj defendis la saman tezon kiel mi, sed senenergie. Tial mi "ekbrulis" kaj post tre varma, eble tro vigla parolo mi elŝutis specon de dilemo: Aŭ tiu gazeto defendas la veron, aŭ la malveron. Se la veron, do toleru kaj akceptu ĝin; se la malveron, ne zorgu, ĝi langvore velkos kaj forgesite mortos; kaj aldiris: "La toleremon devas kaj povas praktiki nur la plej fortaj, kaj tiu ĉi estas nun via Partio".

D: - Ĉu aliaj temoj en la debato?

R: - Alia ekscita temo estis, ke la redaktejo de Sennaciulo ne enlasis alitendencajn artikolojn, kvankam porlaboristajn. Laŭ paperoj antaŭe donitaj al mi, pluraj neplaĉaj artikoloj estis ĵetitaj en la korbon. La laborista intertendenca neŭtraleco estis nerespektata, kaj la SAT-gvidantoj estis membroj de la Kompartio, laŭ letero farita de Lanti al ĝi, por pruvi la SAT-ideojn. (Li konscie ne diris la veron).

D: - Vi do parole vundis viajn amikojn...

R: - Senintence kaj sen eĉ unu punkto da malamikeco. Estis necese scii ĉu mi estis ĝuste informita. Mi agis sincere kaj volis klarigi la situacion. Mallojalaĵon mi ne povis kompreni nek toleri inter ni.
De tiam jam pasis for sesdekdu jaroj kaj eble ne plu vivas la kongresintoj tiam ne pli junaj ol mi. Tial mi povas skribi sen probablaj konfliktoj personaj, kion mi neniam antaŭe volis skribi. Cetere, tio estis konfirmita tuj post la kunsido, kiel vi konstatos.

D: - Nu, kion vi nun malsekretigas?
R: - Ĵus eksidinte apud la prezida tablo, min ŝokis la aroga teniĝo de Drezen, propra de la tiam forpuŝindaj fikapitalistoj: kliniĝinte sur la seĝon posten, li tenis cigaron en buŝo, kruron sur kruro kun plena esprimo de memkontenteco, de supereco, de sinjoreco...(mi eĉ provis skizi lian silueton). Sammotive la kunsidanta k-dino Limuzine kliniĝis al mi kaj sufloris: "kion vi pensas pri tiaj homoj? Porko!" Mi subite ekĝemis.

D: - Kaj post la kunsido?
R: - Lanti venis al mi kaj per mansigno li indikis ke mi kuniru. Jam aparte en la granda kongresejo, tre afekciite li parolis sekrete: "Ĉu vi deziras ke oni forpelu min el la Kompartio?" "Tute ne, mi respondis, sed ĉu veraj la submanovroj?" "Atentu bone, kara Guma! Vi vivas ekster la nodo de iaj neeviteblaj politikaĵoj, sed sciu ke tiu (li diskrete indikis per la fingro al Drezen) estis cara oficiro, kaj vidante ke la Revolucio venkas, transfuĝis en la revoluciajn vicojn. Mi vidis en tiu gazeteto artikolojn de k-doj Levandovski kaj Zilberfarb. Klopodu kiel eble plej baldaŭ peti ilin, ke ili rezignu tiun kunlaboradon, ĉar li (Drezen) estas tia, ke hodiaŭ li flatas, flatas, (Lanti imitis karesan movon) kaj morgaŭ li trancas la gorĝon! (Lanti eksvingis la manon sub la gorĝo, mienante kruele, kio tre impresis min). Nun, forgesu ke mi diris tion!"
Mi estis konsternita, kaj multe pli, kiam venis al ni la sciigo ke ili ambaŭ estis arestitaj!

D: - Post tio kia estas via opinio pri Lanti?
R: - Nun mi estas certa ke li klopodis enkonduki Esperanton en la mondon de la laboristoj, ke por efektivigi praktike la verkon de Zamenhof li agadis inteligente, eĉ ruze, uzante ĉian rimedon. Oni scias ke Drezen ne nur verkis tiun Historion, sed ankaŭ teoriadis pri la strukturo de Esperanto. Lanti prisekvis lin, kaj timante prave lian transfuĝon al la reformintoj, allogis lin (tion mi malsekretigas) per glorajo kaj faris lin Honora Prezidanto de la SAT-kongreso en Germanio (eble Mainz kaj 1924???).* La manovro estis efika. Drezen restis kaj reprezidis, kiel dirite, la SAT-kongreson en Vieno (1925).
Lanti estis studinta ĝisfunde la reformaĵon, kaj tamen li sin donis plene al Esperanto. Mi povas nun ankaŭ riveli ke por forigi la malutilan duoblecon de Esperanto, li iris armite per sia talento kaj diplomata takto al skisminto Beaufront sugesti kaj insiste peti lian revenon al Esperanto. Beaufront, antaŭ la reakiro de la pasinta gloro, principe preskaŭ cedis; sed senespere deklaris, ke "nun, oni ne sekvus min!"
Post la kongreso en Vieno, Lanti veturis al Ankara. De tie mi ricevis salutkarton kun jena esprimo:..."kaj sciu, ke mi pli ŝatas vin ol multajn el mia Partio". Kaj reveninte, li proponis al mi fariĝi la salajrata redaktoro teĥnika de Sennaciulo. Bedaŭrinde mi ne povis akcepti la allogan postenon, pro mia transloĝiĝo al la sudo de la lando. Tiun postenon okupis la pionira bulgaro Krestanov, kun kiu mi renkontiĝis en la SAT-kongreso en Liono (1926). Al tiu kongreso mi iris sole, per biciklo, pedalante centojn da kilometroj sur montaj ŝoseoj. En tiu kongreso feliĉe estis malaprobita unu freneza propono pri starigo de propra Akademio de Esperanto. Ankaŭ tie mi estis vokita sur la estradon, apud Krestanov, kiu pro militbombado forperdis sian tutan libraron.


D: - Kio sekvis?
R: - For de la Movada kerno mi tamen vivadis ĉiam kun esperantistoj, sed mia publika rolo stompiĝis. Dume mi konatiĝis kun Petro Stojan, kaj rilatis longe kun li, precipe persone, ĉar li intencis rezidi tiuregione. Liajn leterojn mi ankoraŭ konservas, kaj ankaŭ tie ĉi mi devas riveli nigran punkton, nome ke li invitis min kunreformi Esperanton. Sed mi ne respondis. Kelkan tempon poste mi estis ĉe akademiano Defi Dalmau. Li montris leteron de Stojan kun reformpropono. Ankaŭ Dalmau rifuzis.
La mondo estas ĉiam malkvieta. Ankaŭ mi ĉiam sentis ian internan rimorson pro mia tiutempa morala agreso al Lanti kaj kolegoj. Mi havis la tutan sincerecon sed ankaŭ plenan mankon de politika sperto. En Hispanio fariĝis Respubliko, kaj mi revenis la patrolandon. Kun kursanoj kaj amikoj ni alestis la SAT-kongreson en Valencio (1934), kie mi renkontis mian malnovan, elstaran amikon Jaume Grau, la kompilinto de Kataluna Antologio. Vespere, preskaŭ jam nokte, k-do Barthelmess prelegis pri muziko en ĝisrande plena teatro, kaj tuj poste mi devis prezenti (ĉar ne avizite), sur la estrado, mirigajn memorekzercojn, pri kiuj raportis Sennaciulo.

D: - Por fini, kian formulon vi havas por prosperigi rapide Esperanton?
R: - Absolute nenian! Sed mi povas malkaŝi, krom ĉio dirita, ankaŭ artifikon, per kiu Esperanto rapide ruiniĝus.

D: - Ŝajnas ke vi parolas ironie....
R: - Ne, kontraŭe, tre serioze. Por nepra ruinigo de Esperanto, estas pli ol sufiĉa la verkado kaj eldonado de lernolibroj kun falsitaj reguloj de la lingvo de Zamenhof.

Intervjuis: V. Hernandez Llusera

**NDLR: Verŝajne Frankfurto 1922 kaj Kaselo 1923.*



Djemil KESSOUS

UNIVERSALISMO

Ĉu vi jam legis ĝin? Mendu ĝin ĉe SAT. Prezo 12 € inkluzive afrankon.



77-A SAT-KONGRESO BRATISLAVA (SK) 2004--08-14/21

Organiza garantianto : KAVA-PECH, kongresa kaj kleriga agentejo de Petro Chrdle, kunorganizanto: ESO, Esperanto-Societo Bratislava.

Koresponda adreso: KAVA PECH, Anglicka 878, CZ-25229 Dobrichovice. Tel: +420 257 712 201; fakso: +420 257 712 126; rete: info@kava-pech.cz; http://www.kava-pech.cz.

OKK: Petro Chrdle, Zdenek Pluhar, Jana Melicharkova, Jarmila Rechtorysova, Marteno Minich.

La 77-a SAT-kongreso okazos unuan fojon en Slovakio, precize en ĝia ĉefurbo Bratislava, kiu logas kaj pro sia beleco urba, kaj pro la konekto kun bela naturo: rivero Dunaj (Danubo), montetaro Malé Karpaty (Malgrandaj Karpatoj).

Kongreskotizoj (en Eŭroj)		ĝis 30.04.04	ĝis 30.06.04	pli poste
SAT-membro		65	75	85
SAT-geedzoj (se ambaŭ)		95	110	125
SAT-junul(in)o ĝis 25 j.		30	35	40
Nemembro de SAT		80	90	100
Junula nemembro de SAT		40	45	50

Infanoj ĝis 10-jaraj ne pagas kotizon.
La partoprenantoj el CZ, HU, PL, SI, SK ĝuas 30% rabaton. La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa YU (krom SI, eksa SU kaj ekster Eŭropo (krom Aŭstralio, Israelo, Japanio, Kanado, Korea Respubliko, Sud-Afriko kaj Usono) ĝuas 50 % rabaton.

ATENTU : Personoj el landoj, kiuj bezonas enirvizon por Slovakio devas indiki tion antaŭ la 30-a de aprilo 2004. Pli poste ne plu eblos trakti tion. La partoprenantoj de la postkongreso konsideru, ke la postkongreso okazos en alia ŝtato (Ĉeĥio) ol la kongreso. Tial oni devas prizorgi apartan enirvizon, se ĝi estas postulata.

Postkongreso en Prago kaj Bohemia Karsto, 2004-08-21/28:

Dum la postkongreso oni havas ŝancon konatiĝi kun la malpli konataj partoj de Prago, nome kun la teritorioj de la protektata naturo. Kompreneble, tiuj kiuj ĝis nun ne vizitis Pragon, povos fari promenon tra la historia centro. Certe oni povos vidi la naturprotektan regionon de Bohemia Karsto kaj de la grotaro de *Koněprusy*. Al la laste menciita regiono apartenas ankaŭ la plej konata bohemia kastelo *Karlštejn*, iama reĝa fortikaĵo protektanta regnestrajn simbolojn.

Tranoktado en la hotelo ***U České koruny**** (= "Ĉe la Ĉeĥa Krono"), en la urboparto *Řeporyje*, kun la bona konekso al la urba centro. La ĉambroj enhavas proprajn banĉambron kaj necesejon, TV-SAT kaj telefonon. **En la prezo estas 7 tranoktoj, 3 ĉefaj manĝoj tage, la ekskurso tra Bohemia Karsto** per speciala buso, **la tutsemajna bileto por la urbaj trafikiloj, 3 enirbiletoj kaj Esperanta ĉiĉerono.**

La suma prezo de la postkongreso por unu persono en eŭroj (EUR):

Tranoktado en la ĉambro:	unulita	dulita
La suma prezo en EUR:	**579,--**	**467,--**

Speciala oferto aparte pagenda: Nigra Teatro por 14,00 EUR.

Kelkaj informoj por la partoprenontoj de la 77-a SAT-kongreso

La tutsemajna vojaĝbileto

Venis demandoj, ĉu utilas mendi (kaj sekve devige aĉeti) la tutsemajnan vojaĝbileton. Kompreneble, la bileto ne multe utilos por tiuj, kiuj loĝos en la kongresejo mem, t.e. en City Hotel Bratislava. Nepre rekomendinda estas por la kongresanoj, kiuj loĝos en la studenta hejmo Lafranconi (ili ĉiutage vojaĝos al la kongresejo), eventuale por tiuj, kiuj planas plurajn privatajn vizitojn de la urbo dum la semajno. Ni intence ne anoncis la prezon, ĉar ĝi verŝajne estos ŝanĝita ĝis la kongreso, nun la prezo egalas proksimume al 9 eŭroj.



Ekskursoj

Bedaŭrinde pro la troŝtopita programo ne eblos organizi duontagajn ekskursojn tiamaniere, ke ĉiu kongresano povu partopreni en ĉiuj ekskursoj. Ĉiu povos ĝui la duontagan ekskurson D1 dimanĉe posttagmeze (promeno tra la historia parto de la urbo). La ekskursoj D2, D3 kaj D4 estos organizataj tiel, ke lunde posttagmeze okazos **samtempe D3** (*Gabčíkovo*) **kaj D4** (la burgo *Devín*), marde posttagmeze okazos **samtempe D2** (la atomcentralo Bohunice) **kaj D4** (la burgo *Devín*). Tial unu el la paralelaj ekskursoj vi devos forstreki el via eskursa plano.

La **tuttagaj ekskursoj** okazos ĉiuj samtempe dum merkredo, jam la Dua Bulteno anoncis, ke tial oni povas elekti nur unu.

Rekomendinde estas, mendi la ekskursojn sufiĉe frue. La ekskursoj povos realiĝi se estos minimume 15 pagintaj ekskursanoj. La supra limo estas 45 partoprenantoj (nombro de sidlokoj en buso). Per malfrua aliĝo vi riskas, ke ne estos libera loko en la ekskurso, kiun vi elektis.

Mendoj de la loĝado

La organizantoj petas, ke la partoprenontoj de la kongreso **mendu la loĝadon** en la hotelo, resp. en la studenta hejmo, **ĝis la 30-a de aprilo 2004**. Necesas precizigi la mendon en la hotelo kaj la studenta hejmo, eventuale nuligi la superfluajn antaŭmendojn. Pli malfruajn mendojn ni akceptos sen garantio de la prezo anoncita en la Dua Bulteno (dependas de la liberaj lokoj en la hotelo, resp. studenta hejmo, kaj de la tiumomentaj prezoj, kiuj povas esti konsiderinde pli altaj).

> *INFANOJ !*
> *Kongresanoj kiuj deziras kongresi kun siaj infanoj en Bratislava, bonvolu* ***tuj*** *kontakti la OKK-on, ĉar por organizi ion por infanoj necesas koni ilian nombron.* ***Atentu:*** *viaj infanoj nepre devas paroli Esperanton.*

La organizantoj ne povas garantii, ke ili por ĉiuj, kiuj mendis dulitan (eventuale trilitan) ĉambron, povos trovi sufiĉan nombron de kunloĝantoj. Kaze, ke ne estos sufiĉe da ili, la mendinto devos alpagi la prezon por la unulita ĉambro. Ĉi tiu atentigo, kompreneble, ne validas por tiuj, kiuj mem trovis kaj anoncis kunloĝanto(j)n. Do denove validas: ju pli frue venas la mendo, des pli granda probablo ekhavi kunloĝanton.

Kunsido de frakcioj

La estroj de la frakcioj (grupoj, sekcioj) estas petataj **tuj anonci** siajn **dezirojn** koncerne **la ejojn de kunsidoj**, ke oni povu definitive aranĝi la programon de la kongreso.

Suplemento de la listo de la aliĝintoj al 77. SAT-kongreso (11.03.2004)

87. MARKOV; Flora; FR
88. MARKOV; Ansofi; FR
89. MARKOV; Vinko; FR
90. AUDERSKAJA; Tatjana V.; UA
91. MICKLE; Gary; DE
92. DE WEERD, Stella; BE
93. DEGOUL, François; FR
94. HERNANDEZ UBEDA, Pedro A.; ES
95. RADA, Jiří; CZ
96. PETIK, János; HU
97. CHYTIL, Ludvík; CZ
98. FILIMONOVIĆ, Dragiša, YU
99. FILIMONOVIĆ, Jovanka; YU
100. DŽONIĆ, Vesna; YU
101. STOJANOVIĆ, Obrad; YU

Sume 101 aliĝintoj el 17 ŝtatoj (kaj 4 kontinentoj)